

FLURO LA FOINO

Novelo de

Ernest Claes

Origina nederlandlingva titolo:

Floere, het Fluwijn (1950)

Esperantigita de

Pieter Jan Doumen

Pieter Jan Doumen
Peerderbaan 81
B-3940 Hechtel-Eksel
Tel. 0031-11 73 20 47
pieter-jan.doumen@telenet.be

ENKONDUKO

La flandra verkisto Ernest Claes (*Zichem 24.10.1885 kaj +Elsene 02.09.1968) naskiĝis en brabantia kampulfamilio. Post sia doktoriĝo pri la ĝermana filologio en la universitato de Loveno li komence aktivis en ĵurnalistiko kaj librokomerco. Post tio li fariĝis ŝtatoficisto Intertempe li fariĝis kunlaboranto de la literatura revuo *Met Tijd en Vlijt*. En 1914 li estis sendita al la fronto. Post kiam li digestis siajn militmemoraĵojn per *Namen 1914*¹ (1916), *Oorlogsnovellen* (1919) kaj *Bei uns in Deutschland* (1919), li akiris grandan popularecon kiel humura rakontisto per sia verko *De Witte* (1920), en kiu li trafe priskribis la petolajn bubajojn de malriĉa, sed gaja blankhara vilaĝknabo. *De Witte* elstaras per freŝeco kaj sukceso, kaj estas skribita en la kolorriĉa sudnederlanda lingvo. Krome, la humuro de Claes ne estas ĉiam tre fajna, tute kiel la kamparanoj, kiujn li priskribis. Krome Claes estas ankoraŭ ĉiam unu el la plej ŝatataj flandraj verkistoj de antaŭ 1960.

La cetera produktaĵo de tiu ĉi regiona popola verkisto konsistas el longa serio da komikaj bonnaturaj, tre ofte senafektaj noveloj kaj romanoj, en kiuj li volonte kaj kun nostalgio rememoras sian junecon kaj priskribas sian naskiĝregionon, kiel *Zichemse novellen* (1921), *De vulgaire Geschiedenis van Charelke Dop* (1924), humura satiro pri militprofitanto, *Het Leven van Herman Coene* (1925-1930), vasta kampilromano kun belega naturliriko kaj infanpsihologio, *Kiki* (1925), tenera rakonto pri la infaneco de sia filino, *Black* (1932), la historio de la hundo de la verkisto, *Kobeke* (1933), tradukita en Esperanto de *Cor Bruins* sub la titolo *Kobo*, *Pastoor Campens Zaliger* (1935), memoraĵoj pri maljuna pastro de *Zichem*, *Jeugd* (1940), aŭtobiografia rakonto pri liaj studentaj jaroj en Loveno, *Clementine* (1940), sendube lia plej bona novelo, *Jeroom en Benzamien* (1947), la historio de du rentuloj en maljunulejo, *Floere* het *Fluwijn* (1950), k.t.p.

En la novelo *Fluro* la Foino, esperanta titolo de *Floere* het *Fluwijn*, Claes skizas en vivaj kolorriĉaj bildoj la mallongan vivon de foino, kiu devas dure batali por povi vivteni sin kaj finfine renkontas la homon-beston, sian plej grandan malamikon, kiu senkompate mortigas ĝin. Skribita en realisma tono el la vidpunkto de la foino, la novelo finiĝas per pesimisma noto: la neevitebla mortigo de la besteto far la homo.

¹Traduko de la titoloj de liaj verkoj: *Namuro 1914* – Militaj Noveloj – Ĉe ni en Germanio – La Blankharulo – Noveloj pri Zichem – La vulgara historio de Karleto Dop – La Vivo de Herman Kune – Kiki –

Estas klare, ke ankaŭ la negativaj militspertoj de la aŭtoro ŝuldas pro lia amara juĝo pri la homo, kiun li vokas 'la plej kruela besto sur la tero'. Per tiu ĉi novelo jam en 1950 la verkisto levis akuzan fingron kontraŭ la homo, kiu kredas povi egoiste disponi pri ĉiuj riĉecoj de la tero, mistaksante la rajtojn de la aliaj, ofte multe pli malfortaj kreituloj. Tiel ankaŭ post la jaro 2012 tiu ĉi novelo gardas ne nur sian tutan literaturan valoron kaj freŝecon, sed ankaŭ sian socian kaj ekologian aktualecon.

Pieter Jan Doumen

* * *

Kampulo Steven Doring parolis al siaj filo. Li diris:

"Ĉi tie ĉe la rando de la herbejo, kontraŭ la arbusttaluŝo, vi konstruu stakon el la acida marĉofojno. Ni uzos ĝin venontjare kiel kuŝŝutaĵon en la bovinejo."

La filoj de Steven Doring konstruis stakon el la malbona fojno kontraŭ la arbusttaluŝo.

I

En la profunda mallumo sub la fojnostako Vela, la patrino de Fluro, konstruis sian neston. La fojnostako situas en ŝia ĉasteritorio, kiu etendiĝas laŭlonge de la vojo de Zichem al Averbode, kaj estas limigita norde kaj oriente per roĵo, kiu serpentumas tra la malsekaj herbejoj, kaj sude, malantaŭ la kampoj, per la ŝoseo al Oxlaar. La kampoj estas pli altaj ol la malsekaj herbejoj, kaj inter ambaŭ etendiĝas larĝa arbusttaluŝo kun rubusoj, prunelujoj, filikoj, genistoj, avelujoj kaj sovaĝa lupolo, kies fibraj rampbranĉetoj kaj tigoj konfuze interplektiĝas, formante nepenetreblan muron inter la kampoj kaj la herbejoj. La fojnostako staras en herbejo kontraŭ la arbusttaluŝo.

Vela konas tiun parton de la mondo de unu ekstremaĵo ĝis la alia, kun ĝia riĉeco je nutraĵo, ĝiaj malamikoj kaj danĝeroj, ĝiaj kaŝejoj kaj sekretoj. Vintre kaj somere Vela trakuradis kaj tra galopadis ĝin ĝis en ĝiaj plej foraj anguloj, komence malantaŭ ŝia patrino kaj poste, kiam iutage tiu ĉi malaperis el ŝia vivo, sola, pelate de malsato aŭ fuĝante antaŭ la homo-besto. Aŭ kiam dum la incitoplenaj postvintraj tagoj ŝia seksarda sango vekis en ŝi la nerezisteblan deziron maltrankvile serĉadi la voluptaman masklon.

Blek – Kobo – La karmemora Pastro Kampens – Klementina – Ĵeromo kaj Benjamins – Fluro la Foino.

Inter la abunde kreskantaj arbustoj de la taluso, inter la altaj herboj de la paŝtejo, sur la kampo, ĉie Vela serĉas nutraĵon, luktas pro sia vivo, kaŝas sin pro la danĝeroj. Sed la granda ĉasteritorio ne apartenas nur al Vela sola. Ankoraŭ aliaj membroj de ŝia raso havas tie sian domon kaj restadejon. Tie sub la alno, tuj apud la roĵo, loĝas unu el ili, kaj en la kava arbostumpo meze de la taluso vivas alia. Sed ili lasas sin reciproke trankvilaj, evitas siajn reciprokajn spurojn, kaj kiam ili senbrue kaŝ-iras unuj ĉirkaŭ la aliajn, ili kontentiĝas per kolereta sibla blovado.

La vintro jam estas foririnta, kaj nun alvenas la hezigitaj martaj tagoj. Sed kiel ajn akre la orienta vento razas la altan kampon, la neĝo estas for, la grundo refariĝas mola, kaj la plantoj kaj bestoj portas ĝermojn de nova vivoforto. La malgranda ronĝulpopolo jam kuraĝas nokte forlasi siajn kavaĵojn kaj tunelojn. Dumtage paseroj, fringoj kaj paruoj sovaĝe kaj netimeme rapidegas tra la ankoraŭ senfolia arbustaro, kaj nun estas ĉie tuj pli da nutraĵo, tiel ke la doloro kaŭzita de la malsato de la longaj vintraj monatoj ne plu brulas en la intesto.

Vela aŭskultas pli atente la bruetojn en la arbusttaluso kaj sur la kampo. Iam kaj iam ŝi subite haltas, levas sian fajnan kapeton, enspiras la aeron kaj ekkuras pluen. Ŝia korpeto estas maldika kaj malpeza, kaj ŝi aŭdas kaj komprenas, kion la varmetaj ventoj flustradas tra la nudaj arbustoj, kion du birdetoj sur branĉo pepadus unu al la alia, kio igas la malgrandajn bestetojn stulte kaj freneze rapi-degadi tra la juna greno. Vela scias, ke la granda maljuna luno denove staras super ŝia ĉasteritorio. Timeme ŝi rigardas ĝin, dum ĝia lumo brilas en ŝiaj nigraj perl-okuletoj. Ĝi pelas tremetojn tra ŝia haŭto. Tie for sur la kampo, ŝi vidas preterpasi Vraton, la melon, kun sia femalo, ne tre malproksime de la kava salik-trunko, sub kiu ili tradormis la vintron. Kaj Vela sentas, ke revenis la tempo, kiam ŝi ne plu deziras ĉasi sola, ke premanta bezono igas ŝin serĉi spurojn de masklo, kaj ŝi eligas plendan seksardan pepadon. Ŝi plantas siajn akregajn ungetojn en la ŝelon de juna alno, kurbigas la dorson, kvazaŭ pretigante sin por fari salton kaj tiam subite ekkuregas pluen tra la arbustaro.

Subite ŝi haltas, levas la kapon super la randon de la sulko kaj ensuĉas la aeron. Ŝi flaras la akran odoron de masklo, kiun tiu ĉi disvastigas dum tiuj tagoj, tiel perfidante siajn spurojn por allogi la femalojn. Senbrue Vela ŝteliras pli proksimen, kaŝita en profunda sulko, kaj ĉiuj ŝiaj nervoj ektremetas, ĉar ŝi malkovras la odoron ne nur de unu masklo, sed aŭdas, kiel du maskloj luktas pro iu femalo. Nun Vela moviĝas antaŭen, krureton post krureto, kaj de malantaŭ genisto ŝi observas la spektaklon.

Katece miaŭante kaj blovante, kun brilaj okuloj kaj blanke nudaj dentetoj, ambaŭ foinoj ĵetas sin unu sur la alian kaj fulmrapide mordas kaj gratas sin reciproke per siaj akraj kruelaj ungetoj. Fojfoje ili staras momenton rekte sur siaj postaj kruroj, unu fronte al la alia, grumblante kaj blovante, la dikan voston rigide rekte etendita, kaj tiam ili subite kurbigas sian tendenon korpeton por nova atako. En la blueta lunlumo iliaj etaj ombroj saltetas samtempe kun ĉiu salto, kaj kiam ili restas alkroĉitaj unu al la alia per la dentoj en sovaĝa furiozeco, ili ruliĝas kiel nigra fadenbulo sur la grundo, aŭdigante korŝirajn dolorkriojn.

Pli malproksime en la ĉirkaŭaĵo ĉio estas trankvila. Nur la sekaj folietoj sur la arbusttaluso susuras, kiam la vento pasas tra ili. Sed tiun brueton la batalantoj bone konas. Ĝi apartenas al la nokto. Nur la luno kaj la senmovaj arbustoj ĉirkaŭ la areno vidas tiun praan lukton pro la posedo de femalo. Kaŝitaj inter la sekaj herboj, sub la malaltaj arbustoj de la taluso, en la sulkoj kaj kavetoj sur la kampo timeme aŭskultas la malgrandajn bestetojn, kiuj ŝtelire alproksimiĝas, nerezisteble altirite de la batalo. La sovaĝaj okuloj de Vela sekvas ĉiun mordan kaj kapton de ambaŭ maskloj. Ŝia vosto kuŝas rekte etendita, kaj nur iam kaj iam leĝere moviĝas la pinto de ŝia vosto.

Subite Vela konsciiĝas pri la ĉeesto de alia foinino. Ŝi iomete levas la kapon. Momenton ŝi forgesas la luktantajn masklojn, dum ŝiaj varmege flamantaj okuloj rapide serĉas... kaj tie, tuj antaŭ ŝi, trans la areno, ŝi ekvidas alian femalon. Ŝrumpinte, tiu ĉi kuŝas inter la sekaj folioj, eklevas iomete la kapon kaj ankaŭ vidas Velan. Vela konas tiun alian: estas tiu de la alno kontraŭ la roĵo. Ŝi estas juna – unujara –, kaj pro ŝi interbatalas la maskloj. Tiam Vela moviĝas pli proksimen, ĝis ŝia kapo eliras de sub la genisto. Tio faras ankaŭ la alia femalo. Ili blovas unu al la alia kun grumbla sono.

Subite la batalo finiĝas. Unu el la maskloj ekflaras kaj vidas Vela kaj saltas al ŝi. La dua masklo ekforkuregas kaj la alia femalo. Vela rapidegas kun la masklo tra la sulkoj kaj arbustoj, la herbejoj kaj arbusttaluso al sia ĉasteritorio.

II

Sub la fojnostako, tuj kontraŭ la arbusttaluso, Vela konstruis sian neston. Ŝi konas la lokon. Tie ŝi ĉasadis kampomusojn ekde kiam la stako estis starigita tie, kaj dum la vintro-monatoj, ŝi kaŝis sin tie dum la tago. La fojno kuŝas sur lito el faskoj de pinbranĉoj, kiuj etendiĝas en ĉiuj direktoj. Super la plej maldikaj pinbranĉetoj Vela forgratis la fojnon kaj fosis en ĝi dolĉan kaj

varman kaveton kun nur malgranda aperturo, tra kiu ŝi en- kaj eliras.

Vela reekzamenas ĉion. Ĉiun sekan pin-branĉeton, kiu estis iomete tro dura laŭ ŝia sento, ŝi forronĝas. Ĉiun kaveton aŭ tunelon ŝi traflaras de unu ekstremaĵo ĝis la alia por vidi, ĉu fremda malamiko trairis ilin. Sed ŝi scias, ke laodoro, kiun ŝi postlasis tie, estas la plej forta rimedo por ŝirmi ŝin kontraŭ la ratoj, musteletejoj kaj erinacoj, kaj eĉ kontraŭ la falsaj vipuroj.

Kiam la nesto estas en ordo, Vela denove iras ĉasi. Sed ŝi ne plu faras malproksimajn rondirojn tra la malsekaj herbejoj kaj kampoj. Ŝi fariĝas maltrankvila, restas en la arbust-taluso kaj ĉirkaŭ la fojnostako, observante la irojn de la kampomusoj kaj la rapidajn flugojn de la birdoj, kaj ŝi ripetfoje reiras al la nesto dumtage kaj dumnokte.

La masklo ne plu kuras ĉien malantaŭ ŝi. Multokupite li iras siajn proprajn vojojn, sed de tempo al tempo li reaperas ĉe ŝia flanko inter la juna verda greno aŭ proksime de la fojno-stako. Tiam li suprenigas sian viglan kapon, rigardas Velan kaj gruntas, sed Vela havas nek deziron nek tempon por stultaj amuziĝoj. Ŝi permesas la masklon kuri post ŝi, sed ne turnas la kapon, kiam li aŭdigas sian seks-ardan pepadon. Nun aliaj zorgoj urĝas Velan, kaj fojfoje ŝi kolere grumblas, kiam la masklo tro proksimiĝas al ŝi.

La tagoj fariĝas pli lumaj, kaj la noktoj pasas pli trankvile. Ĉiuj bestoj estas nun pli timemaj kaj hastaj. Oni aŭdas, kiel ili postkuras unu la alian inter la susurantaj branĉetoj kaj sur la sekaj, bukliĝintaj folioj – kaj Vela aŭskultas. Plena je deziro ŝi tiras siajn molajn lipojn supren sur la blankaj dentoj.

Kiel misteraj estas la nokto kaj la lunlumo dum la nokto! Kiam la luno supreniras de post la poploj kaj ĝia konfuza lumo ekstremitas super la kampoj kaj herbejoj, Vela subite ĉesas kuri, plonĝas sur la grundon, buligas sian korpeton en nigran globeton sur la nigra tero kaj atendas. La luno estas ĉiam necerta kaj maltrankviliga dum la nokto. Ĝi venas aŭ ne venas, ĝi apartenas aŭ ne apartenas al la nokto, sed ĝi ĉiam restas necerta kaj duba, kaj ĉiuj bestoj sentas ĝian efikon en sia timema sango. Vela ne povas vidi la lunon, sed ŝi vidas la objektojn ĉirkaŭ si en la duonlumo, kaj kiam ŝi kuŝas tie, malgranda kaj kaŭriĝanta, estas kvazaŭ ie super ŝi ŝvebas danĝero kiel kaptema ungego. Ie ĉe Vela restis svaga memoro pri nokto kiel tiu ĉi, kiam ŝi naĝis trans la rojo kaj trovis anasneston. Dum ŝi rampis sur la bordon kun krianta anasido en sia faŭketo, la anaspatrino sturmis al ŝi per batantaj flugiloj, sen ke Vela sciis, de kiam ŝi venis. La ombro de la larĝaj flugiloj ŝovis super ŝin, kaj la bato de la dura beko sur ŝian kapon igis ŝin demeti momenton

sian predon por defendi ŝin. Ĉiuj detaloj pri tiu hela nokto restis en ŝia memoro: la ombro, la bato, la danĝero.

En la heĝo kaj talusoj nun burĝonas la juna verdaĵo. Sur la herbejoj kreskas la herbo, kaj la greno sur la kampo estas pli alta. La noktoj estas sekuraj kaj abundas je vivo. Dumtage Vela ne plu forlasas sian neston, ĉar la grandaj monstroj revenis. Ili staras sur la herbejo, la kapon turnita al la grundo kaj manĝas herbon, aŭ ili moviĝas tra la kampo kun pezaj paŝoj kaj laŭta muĝado. Kaj malantaŭ ili ĉiam aperas la homo-besto. Fojefoje tie ankaŭ aperas la hun-do, la plej danĝera malamiko de Vela. Freneze kaj stulte ĝi kuregas post la suprenvolantaj birdoj kaj la junaj bovidoj tra la herbejo kaj bojas. De sia kaveto sub la fojnostako Vela timeme kaŝobservas ĝin, kiam ĝi venas en ŝian proksimecon. Ĉiuj muskoloj en ŝia ŝve-lanta korpeto streĉiĝas, kaj la tremantaj lipoj ŝoviĝas supren sur la fajnaj dentetoj. Kiam la hundo priflaras ŝian spurojn kaj danĝere eksnufas, ŝi tenas sin preta kun kurbigita dorso kaj varmegaj ungetoj. Vela scias de kie la mon-stroj venas sur ŝian ĉasteritorion. Ili venas de trans la alta ŝoseo, el la granda domo de la homo-besto, kie ili ĉiuj loĝas kune. Nur kelkajn fojojn dum la vintromonatoj, kiam malsato tro akre mordis en sian inteston, ŝi kuraĝis iri tien, kaj kvankam tie estis ankoraŭ aliaj anoj de ŝia raso, kiuj ŝtelvagadis en la subtegmentejo kaj tra la grentenejo, kaj eĉ ofte havis tie sian ĉiaman ĉasteritorion, ŝi ĉiam revenis al la mal-ferma tereno kaj la arbusttaluso. Ĉar Vela ne estas domfoinino. Ŝi preferas la furiozan ven-ton kaj la liberan kampon, kaj ŝi estas nature timema kaj singarda bestineto.

Majo vagadas sur la lando...

III

Kaj kiam alvenis ŝia tempo, Vela naskis kvin geidojn en sia ronda, varma nesto, profunde sub la malluma fojnostako. Lanugaj kaj varmaj, ili kuŝas kontraŭ la mola ventro de Vela, kaj kun mallongaj plendaj pepetoj, iliaj viglaj muzeletejoj serĉas la fortigan nutraĵon, kiun donas ŝia pro volupto tremanta korpeto. Aŭ ili kuŝas unuj kontraŭ kaj sur la aliaj en unu nigra laneca bulo, kaj dormas. Vela ne moviĝas. Ŝi etendas sin en la varma ĝuo de sia patrineco sur la neston, repuŝas per la kapo kaj antaŭ-kruretoj kontraŭ sian korpon unu el la geidoj, kiu estas rampinta tro for de ŝi, lekas alian sur la silka felo kaj estas atenta pri ĉia danĝero, kiu povus minaci de ie ajn. Nenia branĉeto de la fragila pinligno povas moviĝi, nenia tigeto de la seka fojno rajtas ŝoviĝi, sen ke Vela aŭdas tion. Ŝia kapeto rapide rektiĝas, ŝiaj muskoloj streĉiĝas kaj ŝiaj

blankaj dentetoj nudiĝas. Ŝi scias, ke estas skarabo, kiu serĉas sian vojon tra la ligno ĉe ŝia kapo, kaj ke super ŝi en la fojno bruetas timema muso. Ŝi konscias, ke ekstere de la fojnostako pasas la tagoj kaj noktoj, kaj ke kun la lumo kaj la mallumo venas kaj foriras la bruoj kaj danĝeroj.

Mole kaj dolĉe interplektitaj, la kvin blindaj gefoinetoj kuŝas kontraŭ ŝia varmiga korpo. Estas unu el ili, kiu ĉiam denove puŝas sian kapeton super la amaseton, kiu serĉas la plej bonan ka plej verman loketon, kiu forpuŝas la aliajn per sia pinta muzeleto kaj siaj teneraj gratkruretoj por premi sin kontraŭ la nutranta patrino korpo. Tio estas la maskleto Fluro. Kiam li ne plu trovas kontentigon por sia avidega buŝeto, li pepas forte kaj devigante kaj premas siajn senripozajn kapeton kontraŭ la kapon de Vela, kvazaŭ por demandi eksplikon. Kaj Vela frotetas lian veluran feleton, ĝis li denove trankvile kuŝas kontraŭ ŝi. Estas alia ido, kiu provas imiti Fluron en ĉio, kiu rampetas post li, ĉiufoje kiam li moviĝas. Kaj kiam ili dormas, ili ambaŭ kuŝas kun la kapetoj unu kontraŭ la alia. Tio esta la femaleto Kria.

Jam du tagojn kaj du noktojn Vela kuŝas senmove en sia nesto. Tiam la malsato, kiu rodas en ŝia ventreto, fariĝas tro forta. La fortoj, kiujn ŝi amasigis en sia korpeto, estas forŝutitaj, kaj per dolorige dura tirado de la suĉantaj buŝetoj, ŝi sentas, ke ŝi ne plu havas lakton. Timeme kaj hezite Vela stariĝas, rigi-diĝinta pro la longa kuŝado. La febla pepado de la timemaj geidoj igas ŝin tremeti. Per sia muzelo ŝi trankvile karesas la moletojn kor-petojn unu post la alian, kvazaŭ ŝi volus sentigi al siaj geidoj, ke ŝi estas ankoraŭ tie, ke ŝi tuj revenos. Ŝi metas sian kapon en la enirtruon de la nesto, rampas tra la koridoreton ĝis la rando de la fojnostako, denove hezitas, kiam ŝi aŭdas la timeman pepadon de siaj geidoj, kiuj sentas, ke io ŝanĝiĝis, kaj serĉas ŝin. Ŝi reiras, denove priflaras la lanugan amaseton kaj tiam foriras. Vela trovas sian nutraĵon en la arbust-taluso ĉerande de la kampo. Ŝi manĝas rapide kaj malsatege. Ĉi-foje ŝi ne estas tiel elektema, kiel kutime. Ŝi malŝatas nek talpon nek kampomuson, eĉ ne la timigitan malrapidan bufon, kiun ŝi kaptas surborde de la fosaĵo.

IV

Ĉiun nokton Vela iras ĉasi en la ĉirkaŭaĵo de la fojnostako, sed neniam tre fore, kaj ĉiufoje timigita ŝi rapidas al la nesto. Vela scias, ke nun minacas multaj danĝeroj, senĉesaj dan-ĝeroj, ankaŭ en la profunda mallumo de ŝia kaŝejo. Ŝi scias, ke Skora, la ruza akvo-ratino, ŝtelvagadas en la ĉirkaŭaĵo, ke ŝi konstruis sian neston ie malalte en la arbust-taluso tre

proksime de la akvofosaĵo. Pasint-somere Vela mortigis la tutan idaron de Skora, kaj Skora restis en la ĉirkaŭaĵo, meditante la tutan tempon pri venĝo. Vela scias tion, sed ŝi ankoraŭ ne havis la tempon serĉi tiun novan neston de Skora por reguligi la konton al ŝi. Unuavice ŝi devas repreni fortojn. Sed senĉese ŝi sentas en si timon por la perfida Skora. Ŝi jam flaris ŝiajn irojn kaj aŭdis ŝin fuĝi ĉirkaŭ kaj eĉ sub la fojnostakon, kaj ĉe ĉiu brueton en la herbo aŭ en la fojno Vela rapidas en freneza timego pro siaj blindaj geidoj.

Iu nokte Vela revenas de sia ĉasiro. Kiam ŝi enrampas tra sia koridoreto sub la fojnostako, ŝi sentas, ke io grava okazis. Ŝi trovas la neston maldolĉe disŝirita. Du el ŝiaj geidoj kuŝas mortigitaj en la nesto, du aliaj, kiuj ram-pis tra la parieton, kompatinde pendas inter la duraj pinbranĉetoj, kaj la kvina estas mal-aperinta. Vela aŭdigas longan plendan pepa-don. Tiam ŝi helpas la du mizeruletojn grimpi el la ligno ree en la neston, lekas la du senvivajn korpetojn, turnas kaj returnas ilin, kaj de pro-funde en la gorĝo, ŝi eligas kruelan mal-amikan blekon. Kiam Vela konstatas, ke ne plu estas vivo en la du geidoj, ŝi forpuŝas ilin malproksimen sub la pinligno.

Tion faris Skora, la akvoratino.

Tuj kiam Vela estas trankviliginta kaj nutrita la du restintajn geidojn, ŝi rapidegas de sub la fojnostako, serĉas kaj snufas, ĝis ŝi trovas la spuron de Skora kaj sekvas tiun spuron preter la rando de la fosaĵo. Tiam Vela haltas, levas la kapon, enspiras la aeron kaj aŭskultas. Trans la malluma akvo troviĝas la arbusttaluso, kaj tie ie estas la nesto de Skora. Nur naĝante trans la akvon, oni povas atingi ĝin, kaj tial nenie proksime de sia nesto Skora postlasis spurojn. Tial Vela atendas, atendas pacience kaj senmove. Nenia hareto de ŝia pelo movi-ĝas, kaj nenia herbeto aŭ branĉeto tremetas, sen ke Vela vidas tion. Tuj antaŭ ŝi rano malgracie plonĝas en la akvon, sed Vela ne moviĝas. Birdo mallaŭte pepas sur branĉo de la arbusttaluso. Vela aŭdas tion, sed ne rea-gas. La luno leviĝas super la suprojn de la poploj kaj kaŝrigardas, kio estas okazonta. Ĝi ne povas vidi Velan, ĉar la mallarĝa ombro de la alta arbusttaluso falas sur la bordon de la fosaĵo.

En la transa flanko de la fosaĵo, sub la malsurpendantaj branĉoj Vela subite ekvidas apenaŭ percepteblajn sulketojn sur la nigra akvosurfaco... Tie estas Skora, kiu sub-akviĝas proksime de sia nesto por ne perfidi ĝian lokon kaj nun naĝas distanceton sub la akvo kaj pli fore emerĝos ĉe la bordo de la fosaĵo. Vela atendas ĝis Skora estas malape-rinta, glitas sub senbrue en la akvon ĝis sub la superpendanta verdaĵo, serĉas kaj snufas sur la akvobordo inter la radikoj kaj aĉe putranta ligno, trovas la

trueton, kiu kondukas al la nesto de Skora, kiu estas kaŝita duone sub kaj super la akvo, kaj per siaj rapidaj kruretoj forgratas la lignon, teron kaj radikojn, kiuj kovras ĝin. Ŝi flaras la idojn de Skora, kiuj timeme pepadus. Kaj tiam, per rapida kruro kaj akregaj ungetoj Vela altiras al si la idojn unu post la alian, mortigas ilin per rapida mordo kaj ĵetas ilin unuj sur la aliaj. Kiam ŝi estas fininta, Vela lekas la sangon de sia muzelo, ŝteliras ree al la bordo de la akvo kaj atendas. Ĉar nun Skora devas reveni...

Kaj tiam Skora denove glitas sur la akvo, formante triangulan sulketon maldekstre kaj dekstre de sia muzelo kaj tenante fiŝeton inter la dentoj, kiun ŝi portas al siaj geidoj. Kiam Skora eksidas sur la dikan radikon tuj antaŭ la enirtuneleto de sia kavaĵo, Vela ĵetas sin sur ŝin. Oni aŭdas mallongan akran dolorkrion kaj leĝeran kraketadon de etaj ostoj. Estas plu nenia Skora en la arbusttaluŝo kaj ĉirkaŭ la fojnostako, kaj Vela, kontenta, retiriĝas al siaj geidoj. Tamen, la unuajn fojojn post tiu tago, kiam ŝi revenas en sian neston, ŝi serĉas la aliajn idojn, ĉirkaŭsnufante tra la fojno, sed ne trovas ilin. Estas nur du da ili: Fluro kaj Kria.

Tiel Vela, la foinino, vivas sur sia ĉasteritorio, kiu etendiĝas sur la kampoj de Worp kaj la malsekaj paŝtejoj de Essel trans la fosaĵo de Lets sur la sablomonteto en la belega regiono ĉirkaŭ la urbeto Averbode. La fojnostako, sub kiu ŝi loĝas kun Fluro kaj Kria, staras forgesita apud la fosaĵo kaj la arbusttaluŝo. Ĝi staros tie ĝis malfrue en aŭtuno.

V

Ĉiumatene la tago etendas pli larĝe sian tremantan lumon trans la malaltan horizonton, kaj ĝia lumo forronĝas, matene kaj vespere, ĉiam pli profunde la randojn de la mallongiĝanta nokto. Iom de tempo la lumo krepuskas malhelgrize super la pinaroj de Oxlaar kaj la montetoj de Vinkenberĝ, kaj tiam la ĉielo denove paliĝas kaj puriĝas antaŭ la komencaĝanta tago. Baldaŭ alvenos nun la blankaj noktoj de Sankta Johano, la bela magio de la eterna somera lumsekreto. Najtingaloj plendas. De la malsekaj paŝtejoj supreniras la fortaodoro de fojno super la lando.

Ĉirkaŭ la fojnostako la herbo staras alte kreskinta kun barbecaj aristoj. En la arbusttaluŝo, inter la humidaj, interplektiĝintaj rubusoj kaj pruneloj, abunde prosperas la solenaj filikoj kaj sveltaj lupolgirlandoj, kaj sur la kampo malantaŭ ili, la jam pli rigidaj, longaj grentigoj kurbigas siajn fajnajn kolojn sub la pleniĝantaj aristoj. Nun ĉie en la greno kaj herbo bruetadas kaj susuradas pro la fervora dili-genteco de la noktobestetoj, kiuj kondukas kaj trejnas siajn idojn laŭ la malnovaj padoj. Vrato, la melo, kaj

lia femalo singarde kuras kun sia idaro tra la sulkoj de la terpomkampoj. Grato, la talpo, fosas siajn tuneletojn inter la betoj. Fojfoje ĝi eligas sian muzeleton serĉfosante el la tero por flari la nokton, ne suspektante, ke iu observas kun avidaj dentoj ĝian blindan aĝadon. Piko, la erinaco, trovas per mallongaj paŝetoj sur la kampvojetoj, haltas, entiras la kapeton, timeme aŭskultas kun duone stariĝintaj pikiloj kaj ekkuras pluen. Svingo, la mus-teleto, rapidas tra grensulko post kampmuso. Jam plurajn tagojn ĝi vane serĉas la neston de alaŭdo. Surborde de la roĝo, Boro, la ruza maljuna akvorato, kaŝobservas la lokon, kie malfrue frajanta ploto perturbas per laŭta vost-frapado la kvietecon de la akvo. Lipa, la dika leporino, plenigas sian ventron, kaŭrante en la juna trifolio kaj manĝante per agacitaj dentoj, kaj tiam saltas ree al sia kuŝejo sub ia genisto, peze moviĝante kial maljunulino. Kaj en la ekstrema angulo de la arbusttaluŝo du kunikloj ludas sian senmalican ludon tuj antaŭ sia kavaĵo. Ĉio vivas kaj moviĝas en la tremanta krepuska lumo inter la verdaj folioj kaj la balanciĝantaj grentigoj.

Fluro kaj Kria kreskas. La nesto fariĝas tro malgranda. Ili nun estas sidantaj en la koridoreto, atendante Velan, kaj tuj kiam ŝi aperas, ili ŝiras la predon el ŝia buŝo, prisnufas ŝiajn muzelon kaj felon kaj flaras la sekretojn de la mondo kaj la nokto. Aŭ ili rampas tra la ligno ĉirkaŭ la nesto ĝis la rando de la fojnostako, sed neniam pli foren, tremetante pro deziro. Kiam ili aŭdas Velan alproksimiĝi, ili resaltetas en la neston kaj luktas pro eksciteco.

Tiam venas la tempo, kiam iunokte Vela forlasas la neston kaj nekolere grumbas, kiam Fluro kaj Kria levas la kapon, plenaj je la deziro akompani ŝin. Vela gruntetas en sia gorĝo sian mallongan logokrion, kiel ŝi faras, kiam ŝi revenas de la ĉaso kaj ne tuj trovas siajn geidojn. Vela logas, atendas en la koridoreto kaj retrorigardas, kaj Fluro kaj Kria sekvas ŝin. Unuafoje ili rigardas la nokton kaj la mondon, ili flaras la freŝan acidan odoron de la tero, kaj inter la altaj herbotigoj, kiuj ĉirkaŭas ilin, lili levas sian sopirantan muzeleton por vidi pli foren. Per siaj molaj lipoj ili tuŝas la herbojn kaj la teron, maltrankvile plorĝemante. La luno pendas super la kampoj. Ĝia malbrila lumo kovras per arĝento la randojn de la ombroj. Senĉese ili sekvas Velan, unue Fluro, tiam Kria, al la bordo de la fosaĵo. Zuf!... Per rapida movo Vela metas krureton sur ranon kaj pre-mas ĝin kontraŭ la grundon. Timigitaj, Fluro kaj Kria plonĝas momenton en la herbon, sed kiam Vela logas, ili alproksimiĝas, priflaras kaj palpas la baraktantan besteton, stariĝas sur la postkruretoj, freneze frapas la antaŭkruretojn unu kontraŭ la alian, saltetas ĉirkaŭ la viktimo kaj denove singarde palpas ĝin. Vela ellasas la

ranon, kiu faras malesperan salton al la fosaĵ-rando. De nove Fluro kaj Kria timeme posteniĝas, sed tiam ili resaltas al tiu ĉi unua viva predo, kiun Vela rekaptas kaj premas kontraŭ la grundon, kaj nun iliaj akraj kruretoj penetras en la molan, glatan haŭton de la besteto. Fluro kaj Kria nun scias, kio estas rano.

Vela denove haltas surborde de la fosaĵo. Nun Fluro kaj Kria staras antaŭ la sekreto de la akvo. Fluro ŝovas sian muzeleton antaŭen tra la dikaj iridotigojn kaj metas la antaŭkruretojn sur la grandan folion, kiu kuŝas sur la akvo. Tiu ĉi sinkas, tiel ke liaj kruretoj tuŝas la akvon. Timigite, li retiras ilin. Nun ili sidas dekstre kaj maldekstre flanke de Vela kaj atendas. Tiam Vela dolĉe glitas en la akvon, gruntante sian logan vokon. Fluro ka Kria plorĝemetas pro tio, postrigardas Velan, kuras dekstren kaj maldekstren, hezite metas krureton en la malsekaĵon, ŝovas la kapeton antaŭen, serĉante – kaj kiam Fluro decidiĝas kaj glitas al Vela, Kria sekvas. Vela naĝas ree al la bordo. Fluro kaj Kria sekvas ŝin. Tiam ŝi denove faras kurbon kaj naĝas al la transa bordo. Ĉiuj tri grimpas sur la arbusttaluson, skuante la akvon de sia korpeto. Kaj ili flaras. Fluro kaj Kria nun scias, kio estas akvo.

Poste Vela kaptas muson, ĝuste kiam tiu ĉi volas fuĝi en sian kavaĵeton. Kaj en la greno, ŝi surprizas alaŭdon sur ĝia nesto. Ŝi tenas la facilan predon kuŝanta sub siaj kruretoj, kaj Fluro kaj Kria metas siajn avidajn dentojn kaj akrajn ungetojn en la muson kaj la alaŭdon kaj sorbas la vivon el la tremetante karno. Fluro kaj Kria nun konas la guston de la varma sango. Kaj iliaj perl-okuletoj brilas pro nesati-gebla deziro kaj sovaĝa, nesondebla krueleco.

La luno paliĝas en la griza ĉielo. Fariĝas mistere kviete. Nova lumo krepuskas super la kampoj kaj herbejoj. Velo aŭdas aliajn bruetojn – la tagon.

VI

Vela kaj ŝiaj geidoj dormas dumtage. Tuj kiam venas la nokto, Fluro kaj Kria fariĝas maltrankvilaj. Malsato pinĉas siajn junajn korpe-tojn, kaj ili plende pepadas. Vela kuŝas volviĝinta en la nesto. Pacience kaj patrinece ŝi ĝuas la petolludadon kaj saltadon de sia idaro. De tempo al tempo ŝi dolĉe karesas ilian kapon, aŭ dorson, ĝis alvenas la horo de la ĉaso. Ĉerande de la fojnostako ili restas ĉiufoje sidantaj dum momento por ekzameni, priflari kaj senti la ĉiufoje novan nokton. Tiam Vela stariĝas sur la postkruretoj kaj etendas sin, ĝis ŝi povas rigardi super la herbon, dekstren al la arbusttaluso, maldekstren al la herbejo, kien dum la tago venas la grandaj monstroj: la bovinoj, la hundo kaj la homo-besto. Tiam ĉiuj

tri ŝteliras laŭlonge de la fosaĵrando tra la malseka herbejo. Ĉe ĉiu alta planto, ĉe ĉiu freŝa talpujo aŭ spuro Vela haltas por permesi al Fluro kaj Kria prisnufi kaj palpi ilin, kaj iliaj brilaj okuloj diras, ke ili komprenas. Kria sur-prizas talpon, kaj Fluro malkovras birdo-neston, kun rapidaj idoj. Ili konatiĝas kun la ĝuaĉo de mortigo, ili lernas suĉi la vivon el la ankoraŭ baraktanta predo, kaj ĉe ĉiu kopto, ĉe ĉiu mordo de iliaj junaj dentetoj riĉiĝas ilia sperto, pliakriĝas ilia instinkto, plikrueliĝas ilia neniam satigebla sangosoifo. La sango, tiu varmeta, dolĉa, sovaĝe odoranta fluidaĵo, kiun ili sentas ankoraŭ bati kaj flui tra la konvulsie etendiĝanta korpeto, estas ilia plej supra ĝuo. Ĝi donas forton al iliaj kreskantaj muskoloj kaj plivigligas la fajron, kiu brulas en iliaj membroj kaj estas la vivo mem. Ĉiun alian nutraĵon ili ĉiam pli malestimas favore al la bona, nutro-riĉa sango, kaj kiam malsato ne plu urĝas ilin, ili postlasas nemanĝita la reston de la ĉas-predo.

Vela transnaĝas la fosaĵon. En la arbustaro ili estas pli sekuraj. Vela konigas al ili ĉiun anguleton kaj loketon de tiu plej riĉa parto de sia ĉasteritorio. Sub ĉiu arbusto, en ĉiu kavaĵeto, ĉe ĉiu forlasita nesto, ŝi lasas Fluron kaj Krian flari kaj grati per iliaj kruretoj. Kiam ŝi subite senmoviĝas kun streĉitaj muskoloj, ankaŭ Fluro kaj Kria haltas kaj sidiĝas sen-move ĉe ŝia flanko, kaj kiam Vela faras sian certan mortigan salton, ankaŭ Fluro kaj Kria falas preskaŭ samtempe sur la predon. Kaj kun kontenta grunto en sia gorĝo ili trinkas ĝian sangon per siaj molkarnaj lipetoj.

Sed estas en la faroj de Vela aferoj, kiujn ili ankoraŭ ne komprenas: kial Vela proksimiĝas malrapide kaj singarde, krureton post krureto, al la forlasita tunelo de kuniklo, snufas sur la grundo kaj per streĉita korpo ŝovas la kapon en la nigran kavaĵon? Vela ne flaras Vokan, la kuniklon, sed Ruĝokulon, la furon, kiu estas de ŝia raso kaj tamen unu el ŝiaj plej danĝeraj malamikoj. Tuj kiam ŝi ekflaras Ruĝokulon, ŝi ekfuĝas. Ŝi evitas Ruĝokulon, kiu havas kontakton kun la homo-besto, ĉasas por li kaj mortigus ŝiajn idojn, se li povus. Fluro kaj Kria ankaŭ ne komprenas, kial Vela haltas, turnas la kapon, kaj aŭskultas, kiam tie for, trans la kampo, resonas stranga voĉo: tiu de virkoko, kiu kokerikas, aŭ de la hundo, kiu bojas apud la domo de la homo-besto. Kaj kiam iunokte Vela saltas al Pino, la vir-erinaco, kaj subite retenas sin kaj eksidas apud Pino, atendante, ĝis li denove montras sian vundeblan ventron, Fluro kaj Kria vikle saltas sur lin, sed ili tuj retiriĝas, dolorĝemante, kun sanganta nazo.

Ĉerande de la kampo staras altaj arboj: kverkoj kun malglata ŝelo, kaj ankaŭ altaj poploj. De tie venas la lumo dumnokte. Vela staras ĉepiede de kverko. Sur la malluma

kampo kuŝas la nokto sur sia dorso, dormante sian somerdormon. La ranoj kvakadas en la fosaĵoj, kaj la najtingaloj kantadas en la arbustoj de la taluso. Nenia folio susuras. Vela rigardas supren al la nigra supro de la kverko, tra kiu tie kaj tie ĉi tralikas blanka streketo da lunlumo. Ŝia instinkto diras al Vela, ke estas tiu arbo kaj ne alia. Ŝi plonĝigas siajn durajn ungetojn en la krusteca kverkoŝelo, etendas sian supran korpon kaj ekgrimpas supren. Fluri kaj Kria scias, ke ili devas sekvi ŝin. Ili metas la kruretojn kontraŭ la arbon, postrigardas Velan, plende pepas pro timo pro la strange ago kaj, firme metante la ungetojn en la neregulajn ŝelsulkojn, ili grimpas supren post Vela. Sur la plej suba branĉo Vela atendas, ĝis ili atingas ŝin. Tiam ŝi grimpas pli alten, de branĉo al branĉo, serĉas kaj snufas ĝis ŝi atingas lokon, kie la trunko fariĝas pli maldika kaj glata kaj la ungetoj povas penetri en la molan ŝelon. Vela logas per sia serpentumanta korpo kaj aten-das. Super ŝi troviĝas la plektaĵo de pignonesto, nigra makulo en la malluma foliaro. Vela aŭs-kultas. Tiam ŝi kroĉas unu krureton al branĉeto super si kaj singarde etendas la alian, ĝis ĝi tuŝas la sekajn branĉetojn de la nesto, al kiu ŝi alkroĉiĝas. Rrrr!!... La virpigo surranda de la nesto subite vekiga el sia dormo kaj timigita forrapidas en la ĉielon per brueta flugilbatado. Ĉiuj tri vidas lian etan ombron pretergliti antaŭ la lundisko. Vela faras sian salton. La pigpatrino havas ankoraŭ ĝuste la tempon suprensalti for de siaj dormantaj geidoj kaj malaperas kun mallonga krio en la nokto. Per unu frapo de ŝia mortiga kruro Vela senmovigas la gepigidojn. Fluro kaj Kria rampas trans la randon de la nesto, kaj la trio satigas sin per la mola karno de la birdetoj supre en la kverkarbo.

Tiel Fluro kaj Kria, kvankam ili ankoraŭ ne komprenas ĉion, iom post iom konatiĝas kun la ĉasteritorio de sia patrino Vela, konatiĝas ĉe ŝia flanko kun la sekuraj lokoj kaj kun tiuj, kie regas danĝero; kun la bestoj, al kiuj ili povas nur singarde proksimiĝi aŭ de kiuj ili devas resti for; kun la lokoj, kiuj estas evitendaj de ili, kaj kun la maniero, kiel oni spionas, alŝteliras kaj kaptas la predon. Iom post iom ili ne plu tiel obeeme trovas post Vela. Tie, kie ili jam konas la ĉasterionon, ili iras sian propran vojon, ŝteliras serĉante predon tra la arbustaluso dum hela tago. Sed ĉiufoje resonas la ankoraŭ timema, averta logovoko de Vela, kaj ili retroviĝas en la malnova nesto. Tiam ili dormas. Ĉiu el ili havas nun sian propran anguleton en la varma fojno, ĉar la nesto estas malordigita kaj multe tro malgranda. Fluro kaj Kria rapide kreskas danke al la fortiga nutraĵo, kiun ili trovas kune, kaj estas nun preskaŭ same tiel grandaj, kiel ilia patrino.

Sed iunokte...

VII

La herbejoj estas falĉataj. Jam de pluraj tagoj tie aktivis pluraj homoj-bestoj. La tri gefoinoj spionas lin dum multaj horoj de sub la rando de la fojnostako, de malantaŭ la volviĝantaj lupolrampaĵoj sur la sekuriga arbustaluso, kaŝ-observante ilin streĉe kaj malamike per siaj brilaj, kruelaj okuletoj. Ili ne komprenas, kion venas fari ĉi tie tiuj grandaj monstroj. Dum-nokte ili ne restas sur la herbejo, sed ĉiu-vespere malrapide foriras tra la kampo. Dum-tage la gefoinoj aŭdas la tranĉan sonon de la falĉilo ĝis kontraŭ la fojnostako. Fojfoje la monstroj venas tiel proksima al la arbustaluso, ke la gefoinoj timeme forplonĝas sub la stakon, ĝis ili vidas kaj aŭdas nenion plu. La hundo, kiu kuras pli rapide ol ili mem kaj ĉiam restas apud la homoj-bestoj, venas flari kaj snufi ĉepiede de la fojnostasko aŭ surborde de la fosaĵo, kaj ĝi konscias – ili scias tion – pri la ĉeesto de Vela kaj ŝiaj geidoj. Brute kaj minace ĝi bojas, ĉar ĝi ne povas atingi ilin. Ĝi estas la plej danĝera el ĉiuj iliaj malamikoj. Fluro kaj Kria sentas tion per la konduto de Vela, kiu kon-vulsie buligas sian mallarĝan korpon, tremetas kaj dolĉe blovas inter la dentoj.

Tiam la monstroj foriras. La herbejoj etendiĝas nudaj. Nokte Vela faradas longajn ekskursojn kun Fluro kaj Kria sur la pala stoplo-kampo ĝis la larĝa rojo. Sub la pala arĝent-kolora lunlumo iliaj ombretoj rapidas kun ili. La sekuriga herbo ne plu estas tie, sed ili vidas nun de fore, kio moviĝas sur la ebena herbej-surfaco. Ili estas pli moveblaj kaj liberaj, kaj nenia talpo aŭ kampomuso, nenia birdo sur ĝia nesto eskapas al ilia rapidaj ungetoj.

La noktoj estas varmetaj pro la dumtaga sunbrulado.

Jam plurfoje, kiam ŝi foriris ĉasi kun sia idaro, Vela eniris la vojon orienten al la granda rojo. Tuj antaŭ la akvo ŝi haltas, etendas la fajnan kapon, ensnufas la aeron kaj mallaŭte gruntas. Tie for trans la rojo etendiĝas vasta hak-arbareto sur la sablaj montetoj. Vela bone konas tiun ĉasteritorio, kie abundas kunikloj. Sed ŝi hezitas. La ĝusta momento ankoraŭ ne estas veninta por Fluro kaj Kria.

Aŭ ŝi kondukas ilin okcidenten ĝis la alia limo de sia teritorio, ĝis kontraŭ la alta ŝoseo. De tie venas la grandaj monstroj. Trans ĝi staras la granda domo de la homo-besto kaj kaŝiĝas multaj danĝeroj. Vela konas ĝiajn duonlumajn grentenejojn, ĝiajn vastajn subtegmenteojn, ĝian fojnsubtegmentejon super la staloj kun la ranca odoro de la grandaj bestoj – magian teritorion kun riĉa predaro. Tie vivas la mal-sovaĝaj kokoj kaj stultaj kunikloj, kiuj vivas enfermitaj en kaĝoj. Sed tie ankaŭ kuŝas neantaŭvideblaj danĝeroj, kiuj surfalas onin en

la plej strangaj formoj. La danĝerojn rilate la vivajn bestojn Vela konas. Ili estas malfermaj kaj klaraj por ŝia kompreno. Ŝi renkontas ilin dum ĉiu el siaj iroj. Ili estas parto de ŝia ekzisto. Vela povas eviti aŭ fronti ilin, laŭ tio, kion preskribas al ŝi ŝia sekureca instinkto. Sed la danĝeroj devenantaj de la homo-besto estas malhonestaj kaj obskuraj, tute kiel la granda domo. Tie kie loĝas la homo-besto, neniam regas trankvileco. Dumnokte kaj dum-tage ĉiu nervoj devas resti streĉitaj, kaj nenian momenton oni povas lasi malfortiĝi sian gardemon.

Vela ne scias, kio estas morto. Ŝi ne pensas. Ŝi ne havas imagaĵojn, bildojn, komparojn. Ŝi konas nur la tuj antaŭ ŝi kuŝantan. Sed kiam ŝi troviĝas antaŭ ĝi, ŝi scias, kion ŝi devas fari, ĉu tie estas danĝero aŭ ne. Kaj tial ŝiaj unikaj spertomemoraĵoj kuŝas en tio, kio estas okazinta en la pasinteco, kaj el tio devenas ŝia sola antaŭvido – la satigo de ŝia malsato kaj la vivteno de ŝiaj geidoj kaj de si mem –, kaj super ĉio ĉi ŝvebas malluma, nesondebla dan-ĝero, la neniigo. Tion ĉi ŝi portas en si same kiel la fidindecon de sia prainstinkto, la certe-con de sia batanta koro. Tion ŝi lernis per ŝia vivo de ĉaso kaj lukto, per la superfortado far la pli fortaj bestoj kaj la predado de la pli malfortaj. Kiu falas, tiu fariĝas predo kaj estas manĝata.

Tial Vela ne kondukas siajn geidojn al la domo de la homo-besto, tiel longe ke ili ne estas plene memstaraj, tiel longe ke ili dependas de ŝi. Kiam ŝi grimpas kun Fluro kaj Kria sur la altan ŝoseon, ŝi restas sidanta tie kun la kapo turnita al la domo de la homo-besto kaj aŭskultas la sonojn, kiuj venas de la domo – kaj deziro brulas en ŝia korpo.

Sed la horo ankoraŭ ne venis. Tiu horo ne venos, neniam plu venos por Vela. Sed tion ŝi tute ne suspektas, ĉar por ŝi ekzistas nur la nuna momento.

Flanke de ŝi sidas Fluro kaj Kria. Ili konscias pri la deviganta dezirego en Vela kiel pri brulanta malsato, kaj ili rigardas kun la sama arda deziro la domon de la homo-besto.

La nokto estas malluma. Nenia griza heleco ŝvebas super la herbejoj, nenia sono de najtingalo aŭ rano aŭdeblas. Monotone mallaŭte susuradas la nokta pluvo, abunde falanta sur la foliojn de la arbusttaluso. Dum ili glitadas pluen sub la malsekaj arbustoj, Vela kaj ŝiaj geidoj aŭdas la batetadon de la pluvo sur la foliaron super si kaj la dolĉan faladon de la gutegoj sur la grundon. Fojfoje la vento blovas tra la arbusttaluso. Tio sonas kiel la bruo de grandaj timigitaj flugiloj. Sed ili konas tiun bruon de la nokto kaj kuras pluen. Nenia interplektaĵo de radikoj aŭ grimplantoj, de prutrinta ligno aŭ dornaj rubusoj haltigad ilin. Certe kaj rapide ili

trovas sian vojon tra la mallumo, kaj ilia senbrua kurado direktiĝas rekte al sia celo. Ĉar Vela havas certan celon ĉi-nokte. Tion sentigas al Fluro kaj Kria ŝia hasta kurado. La antaŭan tagon Vela trafis du kuniklojn en la ekstrema angulo de la arbust-taluso. Estis la idoj de Kuna kiuj grandiĝis. En la lunlumo Vela vidis ilin forsalti kiel fulmojn de la nuda sablomakulo antaŭ sia kavaĵo. Vela estis tie dum la tago, ĉirkaŭtrotetis sur la sablo kaj avide snufis en la aperturo de la kunikla tunelo. Nun la kunikloj certe troviĝas kune en sia profunda nesto, kaj nun Vela venas kun Fluro kaj Kria.

Tiel ili glitadas antaŭen sub la likantaj arbustoj.

Vela konas la acide amarajn odorojn de la tero, de la tago kaj la nokto, de la kampo kaj la herbejo, de la akvo kaj la arbusttaluso. Neniam ŝi eraris. Ŝi aŭdas ĉiun murmureton, ĉiun bruetadon de nevideblaj flugiloj. Ŝi flaras la spurojn de ĉiu viva estaĵo, kaj al ĉiu vaporo tuj reagis ŝia neerarema instinkto. Nun estas tie la varmeta, farunecaodoro, kiu suprenvaporas el la putrantaj ligno kaj folioj kaj miksiĝas kun la dolĉetaj aromoj de fungoj, ŝimoj ka maturaj sovaĝaj beroj, kaj la spica aero de la malsekaj radikoj. Kaj el tiu areo fluas fajro en la sangon de Vela, Fluro kaj Kria, kaj iliaj nigraj perl-okuloj briletas pro sovaĝeco kaj avideco.

Subite Vela ĉesigas sian kuradon kaj tiel plene senmoviĝas, ke nenia hareto de ŝia felo tremas. Antaŭ ŝi etendiĝas meze de la alnoj nuda sabla loketo kun la ronda enirejo de la kunikla kavaĵo. Per hezantaj okuloj Vela fikse rigardas la grundon kaj la tunelon. Sed ŝi ne plu trovas la odoron de sia propra hieraŭa ĉeesto, kiam ŝi postlasis sur tiu ĉi loko sian markon al la aliaj bestoj. Sur la grundo kaj ĉe la enirejo estas alia marko. Vela flaras la frem-dan danĝeran potencon, kiu vagas ĉi tie – la homon-beston. El la kunikla kavaĵo ŝi aŭdas la timeman pepadon de la loĝantoj.

La pluvo plu faladas seninterrompe el la malsana nokta ĉielo. Vela klinas la kapon, maldkestren kaj dekstren kaj priflaras la grundon. La grizaj haretoj sur ŝiaj orelandoj tremetas pro maltrankvileco. Ŝi ŝteliras tra la arbustaro en ĉiuj direktoj, etendas la kolon, levas sin kontraŭ iu branĉo. Timon Vela ne havas, ŝi estas nur maltrankvila. Ŝi flaras la homon-beston, sed tiu ĉi ne plu estas tie. Sed danĝeron estas postlasinta la homo-besto, kiel ĉiam, necertan, nekonatan danĝeron, kiu eska-pas al ŝia besta instinkto, sen signo kaj sono. Per nervozaj kurbiĝoj de sia korpo, ŝi ĝiradas kaj turnadas ĉirkaŭ la nuda sablejo kun Fluro kaj Kria ĉiam apud si.

Kaj tiam ili subite senmoviĝas. Denove ili aŭdas la malrapidan trotadon de silkaj kruretoj en la kunikla kavaĵo... Ili atendas. Sed mal-sato,

sangomalsato pinĉas ilian inteston. Kaj nun Vela ŝteliras per singarde palpantaj paŝe-toj tra la nuda makulo, la okulojn direktitaj al la ronda kavaĵ-enirejon kaj la kapon etendita antaŭen. Singarde, paŝeton post paŝeto ŝi iras pluen...Krrrang!! Dura, seka frapo. Unu solda dolorkrio tranĉas la nokton. Vela estas kaptita inter la ŝtalaj arkoj de pinĉkaptilo, kiu krakigas ŝiajn ostojn. Sekvas mallonga batado kaj baraktado de ŝiaj kruretoj en agonio... Kaj tiam ekestas silento.

La nokto plu daŭras tia, kia ĝi estis. La pluvo ĉiam ankoraŭ susuradas sur la folioj. Tra la malluma sovaĝa arbusttalo kuradas Fluro kaj Kria. Ili fuĝadas por savi sian vivon. Inter la alta greno sur la kampo, Kria malaperas. Fluro neniam plu revidos ŝin. Kaj li neniam plu reiros al la loko, kie lia patrino Vela trovis sian finon en la pinĉkaptilo de la homo-besto.

Steven Doring, la kampulo, malfermas la ŝtalan pinĉkaptilon. Tenante ĝin inter la dik-fingro kaj la montrofingro, li levigas ĝin antaŭ siaj okuloj la kapon de la kaptita foinino kun ŝiaj fermitaj palpebretoj kaj bluaj lipoj, torditaj en grimacon dum la lasta dolortremeto, inter kiuj brilas duraj, blankaj dentetoj. Li ekzamenas, ĉu la altvalora felo ne estas damaĝita, kaj taksas ĝin prezon.

VIII

Kun la paso de la tempo Fluro fariĝis plenkreska virfoino. De la pinto de sia svelta kapo ĝis la pinto de sia vosto, li mezuras sepdek centimetrojn. En lia grize bruna felo la ventharoj malhele punktas sur la pala fonharoj. Sur la brusto li havas blankan makulon. Lia longa vosto kaj liaj maldikaj kruretoj estas kovritaj per pli malhelaj haroj, kaj blankaj haroj orlas la randon de liaj orelkonkoj. Fluro iĝis adoleskinta virfoino kun la akraj, neregulaj dentetoj kaj la alenecej ungetoj de sia raso. En lia muskola korpo loĝas la forteco de la plej fortaj anoj de lia gento.

Kiam Fluro aŭdis la frapon de la ŝtala pinĉkaptilo kaj la faladon de terbuletoj sur la foliojn, kiam li aŭdis la mortkrion de Vela, lia patrino, li ekfuĝis tra la malalta arbetaro tiel malproksimen, kiel li povis, ĝis li eksidis sen-spire kaj senmove sub arbusto. Kun fortege palpacianta ventro kaj briletantaj okuloj, li sidas tie kaj atendas, timante, ke ankoraŭ io terura okazos.

La nokto estas plene kaj peze ŝarĝita per mallumo, kaj la pluvo plu disjetadas sur ĉion sian susuran frapetadon. Iom post iom Fluro trankviliĝas. Por Fluro kaj lia gento estinteco estas mallonga. Ĝi limiĝas je tio, kion instruis

iom post iom al li liaj spertoj, kaj estas ligita al lokoj kaj objektoj, kiuj instigas kaj vekas lian instinkton. Kie troviĝas io specifa, tie li devas fari tion aŭ tion ĉi. Flanke de tio estas nenio krom la urĝa malsato en lia stomako kaj lia sento de sekureco apud Vela.

Tial Vela devas nun veni, kiel ĉiam okazis ĝis nun, kiam li, ĉasante sola, forvadis kaj ŝi serĉis kaj trovis lin. Vela nun subite levos sian vivecan kapeton inter la branĉetoj kaj rigardos lin mallonge kaj intense, kaj tiam li denove sekvos ŝin en ŝiaj spuroj. Tial Fluro atendas, timeme pepante de tempo al tempo. La pluvo plue faladas kun brueto, kiu ŝajnas unuiĝinta kun la nokto. La horoj malrapide pasas – sed Vela ne venas.

Kaj Flure dolĉe pepadas per plenda voĉo.

Kiam la lumo de la griza tago komenciĝas krepuski tra la verdaĵo, ĉesas pluvi, kaj Fluro forlasas sian kaŝejon. Li aŭdas la voĉojn de la birdoj. Singarde li rampas tra la arbustoj, transnaĝas la fosaĵon kaj forglitas sub la fojno-stakon. En la malnova nesto li sidas rekte, la kapon turnita al al la koridoreto, atendante Velan. Li sidas tie la tutan tagon, maltrankvila kaj preta suprensalti. Ĉe ĉiu susuro en la fojno li rapide metas la kapon en la koridoreton, tra kiu Vela devas reveni. Sed Vela ne revenas. Kiam malsato pinĉas lian stomakon, li finfine forlasas la neston kaj kaptas kampomuson, birdo kaj talpon.

La homo-besto aperas sur la herbejop proksime de la arbusttalo. Dum la tago Fluro aŭdas de sub la fojnostako la brueton de fortirata fojno kaj la laŭtan voĉon de la homo-besto. La fojnostako estas malkonstruata. Dum li kuŝas ŝrumpinte en sia nesto, li aŭdas la pezan skuadon de la ĉaro kaj la obtuzan frapadon de la ĉevalpiedo sur la teron. Li ne plu sentas sin sekura en la malnova nesto sub la fojnostako. Kiam venas la nokto, kaj trankvileco, li ŝteliras for. En la arbusttalo, sub la dense interplektiĝintaj rubusoj, li trovas la forlasitan kuŝejon de leporo. Tie li ekde nun ripozas kaj dormas dum la tago.

La granda ĉasteritorio de Vela estas nun la ĉasteritorio de Fluro. Li ĉasas sola.

La tagoj etendas sian larĝan lum-arkon super la velura ĉielo, kaj la noktoj estas sekaj kaj varmaj. Fluro kuras sur ĉiuj siaj vojetoj tra la kampo kaj la herbejo kaj laŭlonge de la arbustoj kaj arbetoj. Li konas la sekretajn kaŝejojn de ĉiuj bestoj, per kiuj li devas nutri sin. Tion li lernis de Vela, sia patrino. Komence li troviĝas ankoraŭ antaŭ enigmoj kaj necertaĵoj kaj hezitas, ĉar li ankoraŭ neniam ĉasis sola. Ĝis nun Vela ĉiam estis kun lin kaj montris al li la vojon. Sed tio ne daŭras longe. Kion li ne lernis per sia propra sperto, instruas al li lia neniam eraranta instinkto. Kie li sentas danĝe-ron, li atendas kun

la pacienco de rabobesto spionanta sian predon. Dum tiuj unuaj tagoj de lia soleco, li nutras sin precipe per ovoĵoj kaj junaj birdoj, kiujn li surprizas nokte sur la kampo kaj en la arbustoj. Kaj kiam liaj avidaj dentoj disŝiras la molan karnon kun sovaĝa volupto, kiam lia avida ĝorgo trinkaĉas la varman sangon, li mallaŭte gruntas, kiel faris Vela, lia patrino.

lutage li surprizas sian unuan grandan predon, Lipan, la leporinon, kiu, kaŭrante sur la trifoliokampo, dormas kun malfermaj okuloj. Per unu salto li kroĉas sin al la ĝorgo de Lipa, profunde plantante siajn akrajn dentojn tra la felon en la karnon, kaj kiam Lipa, fortege timigita, faras altan salton kaj forkuregas tra la kampo al la arbustaluso kun Fluro pendanta al sia ĝorgo, la foino pli ol unufoje estas ella-sonta ŝin, kiam lia svingiĝanta korpo frapiĝas kontraŭ ŝtonon aŭ branĉon. Sed li ne ellasas ŝin. La sango likas tra la disŝirita vundo en lian ĝorgon, kaj la densaj haroj de Lipa preskaŭ sufokas lin. Sed kiam li sentas, ke Lipa estas elĉerpita kaj malrapidigas sian kuradon, li fiksas la ungetojn de siaj kvar piedetoj ankoraŭ pli profunde en la felon, alkroĉas sin pli firme, gratas tutajn harflokajn el ŝia laneca felo kaj distranĉas ŝian haŭton... Kiam fine Lipa kuŝas sur la grundo kun disŝirita ventro, kaj Fluro estas pli ol satiginta sin per ŝia sango, li rulas sin kun freneza volupto tra la dispecigita karno de Lipa, kaj liaj perl-okuletoj fajreras pro sovaĝa ĝojo.

Plurfoje Fluro renkontas samrasanojn sur sia ĉasteritorio. La unuan fojon ke li batalas kun virfoino, li devas fuĝi kun vundo en la nuko kaj ŝiro en unu orelo. Li ankoraŭ ne akiris sperton sur tiu ĉi kampo. Sed kiam li renkontas la saman malamikon la duan fojon ĉerande de la kampo, ili batalas ĝismorte. Kaj kiam la lukto finiĝas, la alia foino kuŝas senviva en sulko. Fluro ankaŭ mortigas Svingon, la musteleon, kaj ties femalon, kaj kiam iuvespere li atakas Vraton, la melon, tiu ĉi sukcesas fuĝi ĝusta-tempe en sian kavaĵon sub la saliko, kien Fluro ne povas sekvi lin.

IX

lunokte Fluro staras antaŭ la roĵo. Apud la arbustaluso li kaptis talpon, sur la kampo li surprizis alaŭdon sur ĝia nesto, kaj tiam li rekuris tra la herbejoj. La luno veturadas super la malgrandaj nuboj tra la ĉielo. Fluro sidas inter la iridoj surborde de la roĵo kaj rigardas la senmovan akvosurfacon. Subite li vidas la blankan lundiskon sidanta sub la akvo, kaj li kaŭriĝas inter la verdaĵo. Liaj okuloj timeme kaŝobservas tiun strangan lun-enigmon, kaj li atendas. Sed kiam la mistera estaĵo restas senmova sub la akvo, Fluro komprenas, ke el ĝi eliras nenia danĝero. Iu perko tranĉas tra la

roĵo, disŝirante momenton la trankvilecon kaj la glatan ebenon de la akvo. La kapon etenditan antaŭen, Fluro ĵetas sin inter la iridotigojn. Tiam ĉio retransviliĝas.

Fluro okulas al la malluma transa bordo de la roĵo. Kio estas tie? Estas mondo, kiun li ne konas, fremda ĉasteritorio, al kiu Vela neniam kondukis lin. Tie Vela ricevis bategon de la sovaĝa anaso, kies idon ŝi kaptis, kaj ŝi ne plu riskis transnaĝi la roĵon kun Fluro kaj Kria. Sed malsato kaj la nebridebla koro de Fluro pelas lin pluen. Dolĉe li glitas en la malluman akvon, kiu fortremas antaŭ li en maldikaj streketoj. La lundisko tremetas, sulkigigas kaj rompiĝas sur la akvosurfaco, kaj Fluro naĝas rapide, senbrue al la transa flanko. Li rampas inter la altan bordherbon, restas momenton kaŝita sub granda ĉevalpieda folio kaj ŝteliras pluen.

Tie ĉi troviĝas monteto kun malaltaj pin-arbetoj kaj molaj sablomakuloj. Fluro ensnufas la acidan, incitan odoron de la rezina aero, ŝoviĝas pluen sub la branĉetoj kaj tra la ombroj, neaŭdeble kaj haltante de tempo al tempo. Kun rapida movo de sia kapeto li retrorigardas dekstren kaj maldekstren, pri-flaras la grundon, pri-flaras la spurojn, kiuj ĉeestas ĉie ĉi tie, pri-flaras la arbetrunketojn. Fluro aŭskultas... Nervozaj tremetoj kuras sur lia haŭto. Li aŭdas la bruetadon de veluraj kruretoj trotetantaj sur la seka sablo. Ne plu estas ombro de singarda foino, ne plu estas nigra besteto, kiu dolĉe ŝoviĝas pluen, nenia pinglito moviĝas sur la malaltaj branĉetoj. La luno verŝas sian senvivan blankan lumon sur tiun ĉi nekonatan mondon.

Fluro sidas ĉe la rando de nuda, blanka sabla surfaceto, kiu briletas en la lunlumo. Tie ludas la kvin idoj de Voka, la kuniklo. Dika en sia maljunpatrina felo, Voka sidas apud ili, kaŭrante sur siaj kvar kruretoj tuj antaŭ sia kavaĵo. Per siaj grandaj, maldormaj okuloj kaj kun siaj longaj tremetantaj lipharoj ŝi rigardas siajn petolantajn geidojn, kiuj senzorge rul-faladas unuj sur la aliajn kun movetiĝantaj vostflokaj kaj svingiĝantaj oreloj, ĝuante la varmon de la nokto en la paca lunlumo. Kelkfoje ili ruliĝas ĝis la rando de la flava sablejeto, proksime de Fluro, kiu flaras la varmetan odoron de iliaj teneraj korpetoj. Unu salto, kaj unu el tiuj geidoj estus lia predo... Sed Fluro ne faras tiun salton. Seninterrompe liaj avidaj okuloj celas Vokan mem. Dolĉe li rampas malantaŭen, ŝovante sian maldikan korpon sur la sablo, ŝteliras senbrue sub la pendantaj branĉetoj kaj ĉirkaŭiras la sablejon, ĝis li troviĝas malantaŭ Voka. Tiam subite aŭdeblas leĝera susuro, dum lia malgranda korpo ĵetiĝas antaŭen kiel sago, kaj antaŭ ol Voka povas retiri la kruretojn de sub sia korpo, la murdaj dentoj de Fluro penetras en ŝian nukon kaj formordas ŝian vivon. Fluro trinkas la sangon de Voka, ĝis lia korpo

streĉiĝas pro satego. Poste li sidas momenton kun la antaŭaj kruretoj en la disŝiritan sangmakulitaj restoj de Voka, sentante kiel iliaodoro kaj varmo supreniras tra lia haŭton en liaj kruretojn. Tiam li trotras ree al la roĝo, la herbejo kaj la arbusttaluŝo.

La sekvan nokton li reiras. Ĉiunokte li reiras tien, ĉar la malsato de Fluro estas nesatigebla. Liaj muskoloj estas kvazaŭ ŝtalaj, kaj sur lia grize bruna felo kuŝas profunda brilo

Steven Doring, la kampulo, paŝas sur sia kampo trans la roĝo. Li ekvidas la spurojn de multaj kunikloj kaj haltas. Li rigardas la grundon, la formanĝitan verdajn kaj de tie turnas la rigardon al la pinetaro, kiu laŭlongas ĝin. En la sablo li vidas labirinton de multegaj spuroj kaj multajn rondajn kavaĵojn. Sulketo kuntiriĝas sur lia dura frunto. Steven Doring parolas al siaj filoj. Li diras:

“La kunikloj formanĝas nian tutan vintrogrenon. Ni devas neniigi ilin per la furo, la pafilo kaj ŝnurkaptiloj.”

La filoj de Steven Doring, la kampulo, faras tion.

X

Ĝis nun Fluro ĉiam trovis siajn predojn sur la grundo, en la abustoj, sur la kampo, en altaj arboj. Sed iun nokton li penetras en la kavaĵon de Voka, la kuniklino. La kavaĵ-aperturo troviĝas kaŝita sub erikarbusteto. Estas maltrankvileco en la aero. Fluro flaras la ĉeeston de la homo-besto. Ĝis profunde sub la tero li rampas pluen. Li vidas la mallumajn koridoretojn maldekstre, dekstre kaj rekte antaŭ si, kaj el ili ĉiuj logas lin laodoro de la dezirata predo. Sed Fluro hezitas.

Tiam li subite aŭdas strangan brueton. Tra ĉiuj koridoretoj sonas la leĝera trotetado de sovaĝe kuregantaj kuniklaj kruretoj, la frotado de feloj kontraŭ la sablaj parietoj de la tune-letoj. Li aŭdas ankaŭ ion pli strangan: mallaŭ-tan tintadon, kiun li ne konas. Kaj antaŭ ol Fluro povas reveni al si, li vidas Ruĝokulon, la furon, la albinon kun la blanka felo kaj la sang-okuloj, kun tintilo pendanta de la kolo par ĉasi kuniklojn; Ruĝokulon, kiun la homo-besto mal-sovaĝigis kaj ellasas por ĉasadi. Fluro scias instinkte, ke Ruĝokulo estas la plej danĝera inter ĉiuj siaj samrasanoj de la mustelgento. Ruĝokulo rekonas sian plej obst-nan mal-amikon. Per ardaĵoj, li atente observas Fluron, dum li malrapide alproksimiĝas.

Per la unua mordo de Ruĝokulo Fluro ekscias, ke lia malamiko estas pli forta ol li mem. Lia nazo estas ŝirita, sed ankaŭ krureto de Ruĝokulo estas vundita. Sekvate de Ruĝokulo li posteniĝas tra la mallarĝa kunikla

koridoro, kies sablo li sentas fali en sian felon, kaj ili rigardas unu la alian per murdemaj okuloj, siblas kaj gratas la teron per nervozaj ungoj. En la mallarĝa tunelo ne estas ebleco salti dekstren aŭ maldekstren, kaj lia senegala rapideco ne utilis al Fluro ĉi tie, se li atakus sian malamikon. Sed nun Ruĝokulo estas pli forta kaj lia mordo mortiga, kaj dum la furo tordiĝas kiel serpento, preparante sian duan salton, Fluro ŝovas malantaŭen sur la ventro. Subite li ekvidas dekstre de li flankan kori-doreton. Per rapida salto li malaperas en ĝin. Sed fulmorapide kaj miaŭante kiel kato, Ruĝokulo saltas post li. Liaj dentoj kaptas la voston de Fluro, kaj tiel kunligitaj, ili kuregas tra la malluma kuniklokavaĵo. Fluro krias laŭte kaj raŭke pro doloro kaj furiozeco. Li scias, ke li ne povas turni sin por mordi Ruĝokulon, kaj ke lia sola vivoŝanco kuŝas ekster la kavaĵo, en la libera spaco.

Antaŭ la enirejo de la kunikla kavaĵo sidas unu el la filoj de Steven Doring, la kampulo. Jam la kvaran fojon li malligis la kaptoreton, kiun li fiksas antaŭ la aperturo. Ĉiufoje li kaptis per unu mano la kuniklon ĉe la malantaŭaj kruroj, levis ĝin baraktantan korpon, donis al ĝi fortan frapon post la oreloj per la alia mano kaj metis ĝin en sakon. Li jam estas preparanta la reton por la kvina fojo, kiam li aŭdas nekutiman brueton. Kaj antaŭ ol li konsciiĝas pri tio, kio okazas, nigra fulmo svingiĝas preter li, sekvata de Ruĝokulo, kiu estas devigita ellasi sian malamikon pro elstara arboradiko tuj ĉe la aperturo. La filo de Steven Doring, la kampulo, rekonas Fluron kaj blasfemas.

Dum pluraj tagoj Fluro devas leki siajn vundojn. Sed tiam li reiras al la arbarmonteto, pli singardema kaj vorema ol iam. Dufoje li trovas senvivan kuniklon en ŝnurkaptilo kaj ĉiufoje li preteriras sen tuŝi ĝin. Li evitas la aperturojn de la kuniklokavaĵoj, ŝtelvagias spionante sub la malaltaj pinbranĉetoj kaj kaŝ-observas la sablajn makulojn, kie junaj kunikloj petoladas en la lunlumo.

Kaj tiam, frue iun matenon, kiam la lumo jam pendas super la arboj kaj li ĉesigas sian ĉasadon, li travivas sian plej teruran timegon. Flarante la ĉeeston de leporo dum unu el siaj ordinaraj serĉ-iroj. Fluro subite vidas tuj apude ekbrili ruĝan lumradion kaj samtempe aŭdas kraki fortegan tondron. Tuj poste resonas la mortkriego de la leporo, kaj aŭdiĝas mallonga forta susuro, kiu rapidas tra la branĉoj, dum pinpingloj kaj pecetoj de arboŝelo flugas preter li. Fluro tiel forte timiĝas, ke li nevole faras salton de unu futo supren. Momenton li estas plene konfuzita, kaj por kvietigi sin, li plantas la ungetojn de siaj antaŭpedetoj en la ŝelon de pinarbeto. Tiam la branĉoj estas bruske forba-

tataj, kaj la homo-besto preterpasas kun pafilo sub la brako.

XI

Blankaj nebulspiritoj ŝvebas super la fosaĵoj kaj la malaltaj sekaj herbejoj, kaj la nigra vesto de aŭtuna nokto jam etendiĝas super la resto de la mallongiĝanta tago. Pluvadas, daŭre pluvadas sur la marĉaj herbejoj kaj la nudaj, sekaj argilaj kampoj. Obtuze sonantaj akvosagetoj penetras tra la maldensiĝanta volbo, kiun formas la lastaj folioj de la arbusttaluso, kie la noktobestetoj tremetante kaŝas sin en siaj somerloĝejoj. Hazo, la leporo; fuĝis for de la nudaj kampoj al la arbaro, kaj Vrato, la melo, reiris al sia malnova loĝejo sub la saliktrunko. La predaro maloftiĝas kaj timiĝas. Multaj birdoj estas for. La folioj senĉese faladas. La rojo rampis super siajn bordojn, tiel apartigante la pinarbareton de la herbejoj.

Vintro estas venanta.

Kial lia patrino Vela iam staris sur la bordo de la ŝoseo kun siaj geidoj, nun tie staras Fluro. Kaj kiel iam faris Vela, ankaŭ Fluro levas la kapeton kaj rigardas al la domo de la homo-besto. Li vidas nenion kaj aŭdas nur la susu-radon de la pluvo sur la folioj de la kverkoj laŭloge de la ŝoseo. Sed li scias, ke la domo de la homo-besto troviĝas tie, tuj antaŭ li, trans la vojo, kun ĉiuj siaj danĝeroj. Li ankoraŭ ne scias, kion enhavas tiu mondo nova por li, nek kiel li povas penetri en ĝin. Sed la instinkto de Fluro estas tiel certa kiel la eterna sinsekvo de noktoj kaj tagoj, kaj diras al li, ke li trovos tie satigon por sia eterne ronĝanta malsato. La urĝo en lia sango anstataŭas lian pens-kapablon.

Fluro transkuras la grandan vojon. Malrapide li ŝteliras laŭlonge de la heĝo, ĝis li atingas longan kaj altan muron. Li scias – sed kiel li scias tion? –, ke li devas turniĝi dekstren. Nun li staras antaŭ la pordego de la grentenejo. Singarde li premas la nazon kontraŭ ties truetojn kaj fendetojn. En ĝi troviĝas ankaŭ pli granda truo, tra kiu Fluro certe ne povas facile pasi. Sed Fluro tordas kaj volvas sian suplan korpon tra la mallarĝa aperturo – kaj estas en la grentenejo.

Finfine Fluro troviĝas en la domo de la homo-besto.

Li sidiĝas apud la aperturo, tra kiu li rampis. Liaj akraj okuletoj traboras kaj sondas la malluman spacon antaŭ li. Li vidas sufiĉe. Li priflaras la nudan plankon, la tenejpordegon, la pajletojn, kiuj kuŝas apud li. Unue Fluro devas koni la odorojn de la objektoj. Ili devas gvidi lin. Ĉie kaj ĉiam ili estas lia sola kaj plej granda certeco, tute kiel la funkciado de lia prudento. Kaj subite Fluro scias.

Dekstre, sub la pajlo pepas muson. Li aŭdas la trotetadon de ratkruretoj en la plej malproksima angulo. Kvankam liaj okuloj direktiĝas ĉiufoje al la loko de la brueto, Fluro ne moviĝas. Post tio li kuras per singardaj paŝetoj tra la ebena draŝplanko, haltas ĉe ĉiu objekto, kiu kuŝas tie, priflaras kaj palpas ĝin. Kaj daŭre Fluro konscias, ke li estas enfermita kaj ke ĉi tie minacas danĝeroj, kiuj estas fremdaj al liaj spertoj kaj travivaĵoj. Kaj dufoje li kuras ree al la aperturo en la teneja pordego por vidi, ĉu ĝi estas ankoraŭ ĉiam tie.

Tie ĉi ankaŭ estas alta eskalo... Li metas la antaŭkruretojn sur la plej malaltan ŝtupeton, levas la kapon kaj mezuras la malluman altecon super li. Ŝtupeton post ŝtupeto li grimpas pli alten laŭ la eskalo, malrapide kaj ĉiufoje per mallonga salteto. Ĉiuj muskoloj de lia supra korpo aktivigas, kaj li gustumas la mucidan aeron de la subtegmentejo. Li sidiĝas momenton sur la randon de la subtegmenteja fenestro kaj mallonge ekzamenas la vastan spacon antaŭ li. Tiam li saltas sur la plankon kaj kviete promenas tra la sekura subtegmen-tejo. Ratoj kaj musoj timigitaj fuĝas al siaj kavaĵetoj laŭlonge de la muro, kie la tegmento preskaŭ tuŝas la subtegmentejan plankon – kaj subite Fluro konsciiĝas pri la ĉeesto de sam-rasano. Li flaras tra la ruboj de la mortigitaj roduloj, tra la pajlo, priflaras la muron. Li rekonas la odoron de sia gento. Tiam li sidiĝas kontraŭ la kamenon kaj restas tie senmova kvazaŭ malgranda nigra makulo en la mal-lumo, kaj tenas la rigardon akre direktita al unu punkto. En tiu kava spaco de la subtegmentejo kun unuflanke alta grenstako, kiu atingas la tegolojn, kaj aliflanke vasta, malplena spaco kun tabulplanko, regas silento kaj mallumo. La pluvo egale tamburetas sur la tegolojn kun stranga bruetado, kvazaŭ de miloj da trote-tantaj kruretoj, neniam pli laŭte, neniam malpli laŭte. Sed la kvieteco en la varma subteg-mentejo restas kompakta tuto, kvazaŭ unu sola amaso, en kiun la pluvo ne povas penetri. La ratoj kaj la musoj revenas de la fojnsubteg-mentejo super la bovinejo. Ili troviĝas tremetantaj muzeletoj aperas el la kavaĵetoj kaj fendoj sub la tegmentrando, kaj iliaj brilaj okuloj vagas sur la subtegmenteja surfaco. Tie kaj tie ĉi resonas malforta pepado kiel averto. Senmove Fluro sidas kontraŭ la kameno kaj atendas.

Li flaras la bovinejon kaj scias, kie ĝi troviĝas kaj tra kiu truo la roduloj fuĝas tien. Li flaras la kolombejon, tie for, ĉe la plej fora subteg-menteja ekstremejo, tuj sub la tegmento. Iam kaj iam tie aŭdeblas malforta rukulado. Sed Fluro restas sur sia loko malantaŭ la kameno, la okulojn turnitaj al unu sola punkto kontraŭ la stako de grengarboj.

Nun de tie aŭdiĝas mallonga, malforta grate-tado en la pajlo, inter la muro kaj la grenstako, kaj mallaŭta kraketado, kvazaŭ la sekaj gren-tigoj estus forprenataj unuj post la aliaj. Ankoraŭ pli malgranda fariĝas la al bulo ŝrum-pinta korpo de Fluro. La blanka makulo sur lia brusto malaperas sub lia kapo, kaj ĉiuj liaj muskoloj kaj nervoj streĉiĝas. Li estas preta. Ĉar la besteto, kiu alproksimiĝas per singardaj kruretoj tra la susuranta pajlo, estas la alia, la samrasano. Ĝi estis dormanta en sia nesto kontraŭ la muro, kiam ĝi subite vekigis kaj perceptis novan odoron: fremdulo penetris en ĝian ĉasteritorion.

Fluro la unua ekvidas sian malamikon, kiam tiu ĉi singarde elrampas el sia kavaĵeto. Per unu glitsalto li tuj ĵetas sin sur ĝin. La duraj dentetoj de Fluro pikas en ĝian maldikan kolon. Raŭke stertoranta kriaĉado aŭdiĝas. Kvankam akraj ungetoj ŝiras harojn el lia felo, kvankam la konvulsianta korpo de lia malamiko trenas lin sur la subtegmentejan plankon ĝis kontraŭ la muro, kvankam la atakito tiel forte blovas kaj graŭlas, kaj ĉiuj roduloj ekfuĝas, ĝismorte timigitaj, Fluro cedas nenian momenton kaj ĉiam pli profunde penetrigas siajn senkompa-tajn dentetojn en la tenden an ĝorgon. Nokton post nokto li devas lukti por sia vivo kaj nutraĵo. Li konas ĉiujn danĝerojn. Li scias, kiuj bestoj estas pli fortaj ol li kaj anticipas ĉian baton de sia malamiko, sed li ankaŭ fidas la mortigan mordon de siaj dentoj.

Steven Doring, la kampulo, sidas ĉe la fajrejo en la kampuldoma loĝoĉambro. Li rigardas la fajron kaj pensadas. Tiam li levas la kapon kaj aŭskultas. Steven Doring, la kampulo, parolas al siaj filoj. Li diras:

“Nun ili estas du en la subtegmentejo, kaj ili estas batalantaj.”

La pli aĝa filo opinias:

“Kontraŭ la ratoj kaj musoj estas bona afero.”

La dua filo diras:

“Pro miaj kolomboj mi ne timas. Neniu fojno iam povis ronĝi truon tra la zinkajn vandojn de la kolombejo.”

Kaj la kampulino rimarkis:

“Sed niaj kokinoj!...”

XII

Sinjoro kaj mastro en la subtegmentejo de la homo-besto estas nun nur Fluro. Lia sovaĝa murdemo forpelis la ronĝuletojn ĝis en sia plej malproksimaj kaŝejoj. Kie rato povas trapasi, ankaŭ la supra korpo de Fluro povas trapenetri. Post mallonga tempo Fluro konas la tutan novan ĉasteritorion, kie ne falas pluvo, ne estas malvarmo, kie ĉiunokte li staras antaŭ novaj malkovroj, kaj kie estas neniam danĝeroj. En tiu ĉi libera regno la tagoj sekvas unu la alian plenaj

je agrabla ludado, kaj kiam iafoje li aŭdas la bruojn de la kampuldomo, de la homo-besto, de la bovinoj en la stalo, de la kolomboj kaj de la kokinoj, li akre aŭskultas, sed danĝero ne estas. Iutage la homo-besto grimpis sur la subtegmentejojn. Kion ĝi faris tie, Fluro ne scias, ĉar li forrampis profunde en la neston de la mortigita samrasano inter la pajlo kaj la muro. Sed la homo-besto ne venis pro Fluro.

La kolombejo!... De kiam Fluro unuafoje ŝteliris tra la subtegmentejo, li sciis. Li konas la predon. Sur la kampo, sidante en sulko, li ofte kaŝobservis la kolombojn, kiam ili flugilbatante supreniris. Lia salto ĉiufoje malfruis. Ili loĝas en la domo de la homo-besto, ĉi tie en la varma subtegmentejo sub la tegoloj. La duan nokton de sia restado Fluro staras ĉe ilia loĝejo. Laodoro de la kolomboj ekstreme akriĝas lian deziron. Li serĉas alirvojon al la kolombejo. Al ĉio ekzistas alirvojo, kaj li grimpas supren kontraŭ la nuda brikmuro. La ejo estas pendigita kiel granda ŝranko de la traboj kaj keproj de la tegmento, kaj kiam Fluro atingas ĝian vandon kaj premas sian nazon kontraŭ ĝin, li sentas la malvarman tuŝon de io, kion li ne konas. Per krureto li gratas ĝin, sed liaj ungetoj ne trovas tenon kaj forglitas. Sube li trovas akran randeton kaj metas la dentojn en ĝin. Sed kvankam ĝis nun nenio povis rezisti al la dentoj de Fluro, tiun ĉi fojon ili rodas vane. Fluro grumblas pro kolero. En la ejo li aŭdas la timeman rukuladon de la kolomboj, kiuj sentas lian apudecon, la nervozan trotetadon de iliaj kruretoj sur la planko kaj la leĝeran susuradon de iliaj flugiloj. La korpo de Fluro etendiĝas kaj tordiĝas sur la trabo, sur kiu li sidas. Li atingas la plej supran randon de la ejo kontraŭ la tegoloj, saltas rapide sur alian trabon, rampas laŭlonge de la keproj kaj tegmentlatoj. Pecetoj de mortero falas kun obtuza brueto sur la subtegmentejan plankon, dikaj araneaĵoj pendas sur lia kapo kaj felo kaj preskaŭ blindigas lin. Li provas en la alia flanko, sed nenie li malkovras eĉ la plej malgrandan fendeton aŭ kavaĵeton. La zinkaj platoj ne permesas trairon. Fluro graŭlas, liaj ungetoj kolere gratas la lignon de la tranoj, liaj okuletoj fajreras. Tiu daŭre nealirebleco estas brulanta turmento por Fluro.

Tra vitra tegolo enpenetras la lumo de la venanta tago. En la stalo resonas la bruo de siteloj kaj voĉoj, la kolomboj flugas super la tegmento, virkoko kokerikas... Fluro levas la kapeton, senmoviĝas kaj aŭskultas la kokerikadon de la virkoko...

Fluro pasigas siajn tagojn en la subtegmentejo de la homo-besto. Ekster ĝi la tempo iras sian propran vojon. Vintro venis. Supre, sur la grenstako kontraŭ la tegoloj, Fluro trovas trueton inter la fasadmuro kaj la tegmento. Li

tordas sin tra ĝin kaj rigardas la nokton. La granda domo dormas.

Fluro saltas sur la tegmenton, grimpas ĝis sur la first-rando, kuras de unu ekstremaĵo al la alia, ĉirkaŭ la kvadrataj kamenoj, tiam mal-rapide subiras per serĉantaj kruretoj ĝis la ekstrema malsupra rando de la tegmento kaj sidiĝas. La norda vento blovas per skuoj tra la senfoliaj arbosuproj en la ĝardeno malantaŭ la domo. Mallonge la vento povas silenti, kvazaŭ ĝi sekrete kaŝus sin, kvazaŭ ĝi retenus sian spiron, kaj tiam denove elsaltas kun brua perforteco kontraŭ la arbosuprojn, kontraŭ la nokton, kontraŭ la tegmenton. Fluro rigardas en la mallumo al tiu bruo en la arboj. Li spione rigardas trans la rando de la tegoloj, sur kiu li sidas, en la abimon sub si.

Ĉu Fluro ne scias, dum li sidas tie kaj atendas, ke en la mallumo li rigardas al turniĝo en sia ekzisto? Ke per unu plia salto ekde la ekstrema tegmentrando li finos sian estan-tecon? Ĉar tiam li ne plu staros kontraŭ ofte sursaltata predo, kontraŭ sovaĝa malamiko kaj kunbatalanto el la kampo aŭ la herbejo dum hela lunnokto, sed kontraŭ la homo-besto, kontraŭ la rajto de la homo-besto, la plej kruela rajto de la plej barbara besto? Ĉu Fluro ne scias tion?

Estas nun, kvazaŭ Fluro ne plu rapidus, kvazaŭ li devus longe pensadi, kvazaŭ la pikanta varmego en lia sango estus malvarmiĝinta. Tra liaj du malvarmaj naztruetoj li suĉas la aeron en siajn pulmojn, la aeron de la mallumo sub la tegmentrando, de la sekretoj kaŝitaj en ĝi malantaŭ bariloj kaj muroj, de ia varma predo.

La vento kaŝas sin tute malantaŭ la dikaj, nigraj muroj de la nokto. Silento sinkas sur la tegmenton de la kampuldomo. Li aŭdas tiun silenton. Liaj okuletoj akre spionas supren al la arbosuproj, de kie ĵus venis zumado. Fluro ne vidas, kio estas en la malproksimeco, sed se nun la danĝeo ŝtelirus proksimen, li estus preta.

Estas nenia danĝero en tiu silento. La korpo de Fluro malstreĉiĝas. Kaj tuj poste li sentas apenaŭ percepteblan tikladon, kiu tuŝas sian nazon. Antaŭ liaj okuloj svarmas ŝvebantaj punktoj, grizaj en la mallumo, kaj kiam li rapide turnas la kapon dekstren, li vidas ilin ankaŭ tie, super sia kapo, super la tegmento, ĉie. Fluro priflaras la malsekajn floketojn kaj ne ektimas. Ili malrapide falas el la ĉielo, alproksimiĝas sen ia pereptebla bona aŭ malbona signo kaj tuŝas sian felon, sen ke li sentas tion. La petola svarmado antaŭ liaj spionantaj okuloj, kiu havas nenan odoron kaj nenan sonon, estas sendanĝera. Dum la kuro de la tago, ĉe ĉiu ekskurso, Fluro renkontis aferojn, kiujn li ne konis, kiu estis bonaj aŭ malbonaj, kiujn li devis eviti aŭ al kiuj necesis alproksimiĝi singarde.

Neniam Fluro estis surprizita de la naturo de la aferoj, kiuj devas okazi, kiuj apartenas al la vivo kaj al lia ĉasteritorio. Kaj ĉiufoje lia matu-riginta instinkto diris al li, kie estas danĝero kaj kie ne.

Neĝas.

Sur la ekstrema rando de la tegmento, en la ronda kavaĵo de tegolo sidas Fluro, okulante per siaj nigraj perl-okuletoj al la neĝeroj, kiuj dancadas en la mallumo. Ĉu Fluro estas leganta sian sorton?

Per unu salto Fluro surteriĝas sur la deklivan pajlotegmenton de la kokinejo. La maldika neĝ-tavoletto dissaltas sub lia falo, kaj liaj gratantaj kruretoj desegnas spuron ĝis la alia tegment-ekstremaĵo. Ĉi tie li devas esti. Li forgratas la neĝon, forigas la malnovan pajlon, metas sian akran muzelon en la truon kaj flaras tra la malseka, putriĝinta pajlo...

Sur du longaj stangoj sidas la kokinoj, dense premitaj unuj kontraŭ la aliaj, la kapon metita sub flugilon, dormante sian leĝeran dormon. Iam kaj iam eliĝas mallaŭta kverado el iu inter la plumfaskoj, kvazaŭ ĝi sonĝus. Tabuleto troviĝas ŝovita antaŭ la enirejo. Al la nokto kaj ĝiaj danĝeroj la eniro estas barita, ĝis morgaŭ frue, kiam la virkoko leviĝos sur la ekstremaĵo de sia stango, batos siajn durajn flugilojn unu kontraŭ la alian kaj aŭdigos laŭtan kokerikon, kaj la kampulino forŝovos la tabuleton.

La maldika korpo de Fluro tordiĝas tra la truon. Per siaj du antaŭkruretoj li alproksimiĝas al la pajl-tegmento, kaj tiel li pendas momenton de la plafono per la tuta korpo. Nenia tigo kraketas, nenia ungeto miskaptas. Laŭ la ligna vando de la kokinejo li grimpas malsupren ĝis sur la planko.

Kaj tiam!... Lia tremetanta nazo singarde tuŝas la plumojn de kokino, kaj lia rapida mordo ne maltrafas. La kokino havas nenan tempon por ekkrii sian morttimon. Ŝi kuŝas kun la dorso sur la grundo, batas lastan fojon senespere per la flugiloj kaj gratas per la kruroj tra la aero, metas sian skuantan kapon antaŭen, serĉante la nevideblan malamikon, kaj laŭte klukadas. Fluro ellapas sian senvivan predon. Dua salto... Nun la kokinoj flugas laŭte kriante en freneza timo tra la stalo, sciante, kiu estas tie tuj apud ili, sed ne trovante elirejon, premas sin en amaso unuj kontraŭ la aliajn en angulo de la ejo, kaj ĉiufoje kiam la danĝero ŝteliras apuden kaj defen-dantaj flugiloj ekbatas tra la mallumo, ili denove rapidas en sovaĝa flugo laŭlonge de la muroj, sidas momenton trankvile, ridigiĝintaj pro timo kaj aŭskultantaj la stertoradon de morto, ĝis ĉio silentiĝas.

Kaj tiel komenciĝas por Fluro la plej granda festeno en lia vivo. Ebriega je sangoĝuo li trinkaĉas kaj suĉas la fortan vivosukon el la trematanta karno de la varmaj korpoj. La sango

mallaŭte plaŭdbruas en lia avida gorĝo, kaj li gruntas pro satigita kontenteco. Volup-teme li turnas kaj returnas sian kapon en la disŝiritaj korpoj, ĝis la sango krepuskigas liajn okulojn kaj gluas al lia tuta felo. Fluro flaras ĝin kaj plenigas sin per ĝiaodoro ĝis en liaj kapo kaj vejnoj susuras kaj bruetas agrabla kap-turniĝo, kaŭzita de la bona, vivdona sango.

XIII

Vastas la mondo.

Blankaj kaj nudaj kuŝas la malsekaj herbejoj sub la pala vintrosuno. Ĉe la fasado de la kampuldomo staras alta, obskura figuro. Estas la homo-besto. Forte per sia homa rajto, ĝi fikse rigardas en la malproksimecon. Apud li sidas la hundo.

Tie for, kvazaŭ nigra punkto sur la blanka neĝ-ebenaĵo, rapidas malgranda, sensignifa nigra estaĵo tra la malferma, flokeca neĝo-tavolo.

La homo-besto, insistante je sia homa rajto, deziras mortigi ĝin. Li etendas la brakon kaj krias ordonon al la hundo, kiu ekkuregas. La nigra estaĵeto en la neĝo forrapidadas por sia rajto vivi, forrapidadas antaŭ la danĝero, kiu reprezentas por li la homo-besto, la plej kruela el ĉiuj bestoj. Ĝi volas mortigi la plej belan estaĵeton, kiun Dio kreis kaj kiu faras nenion alian ol sekvi la eternan leĝon, diktatan de lia malsato kaj lia sango.

Kiam Fluro aŭdis la voĉon de la homo-besto tuj apude en la kokinejo, li ektimis el la nebuleco de sia sang-ebrieco. Ne plu estis tempo aŭ okazo rifuĝi al la sekura subtegmentejo. Tra la pajlotegmento, laŭlonge de la fasado kaj la heĝo, li ekfuĝis, kurante per la tuta forto de siaj kruretoj tra la vasta ebenaĵo, kiu estas la mondo. Lia mondo, kia li ankoraŭ ne vidis ĝin, ne konis ĝin, kaj tra kiun li perdas sian vojon. Trans la ŝoseo, tra la senfina blanka kampo. Blanka, blanka estas ĉio, kaj Fluro vidas kaj flaras nek spurojn, nek vojetojn, ne vidas la neĝokovritan arbusttaluson, vidas nek kavaĵon, nek arbon, nek fosaĵon, nek sulkon, kaj rapidas kvazaŭ blinda; rapidas tra la polveca neĝo, kiu cedas sub liaj kruretoj, kiu ĝenas lian kuron, el kiu lia kapo ne elstaras, kontraŭ kiu li batalas senpove. Li kuras tute rekte antaŭen tra la malnova ĉasteritorio de sia raso, sciante, ke ĉi-foje li batalas kontraŭ malluma neniigo. Li aŭdas la bojadon de la hundo, kiu sekvas liajn spurojn, kaj la koreto de Fluro batetadas kaj hastas en morttimo.

Tiam la hundo estas tuj proksime de li. Li aŭdas la gratadon de liaj kruroj kaj la anhelantan grumbladon, venantan el inter la nudaj dentoj, ĉiam pli proksime, pli proksime, kaj fine tuj kontraŭ li. Kaj Fluro entreprenas sian lastan senesperan mortsalton. Liaj bru-lantaj

dentetoj kaptas la molan karnon de hunda vango, kaj la surprizita besto ekfalas korpon trans kapo, ruliĝas kun Fluro tra la neĝo, terure hurlas pro doloro kaj timo, batas kaj svingas sian kapon en ĉiuj direktoj, dum ĝiaj duraj ungegoj tranĉas tra la felo de Fluro. Sed Fluro mordas siajn dentojn ĉiam pli profunde en la sangantan karnon, dum lia pendanta korpo svingiĝadas kaj ĵetiĝadas laŭ la movoj de la hundokapo. Furioze jelpante, la hundo returnas sin kaj reiras sian vojon. Duone senkonscia, Fluro vidas la danĝeron. Preter la hara kapo de la hundo li vidas alproksimiĝi la homon-beston. Li ellasas la hundon. Kaj denove la nigra korpeto hastas tra la neĝ-ebenaĵo, denove la maldikaj kruretoj batalas kontraŭ la lanugecan pulver-amason Nun li aŭdas la voĉon de la homo-besto, kiu incitas la hundon. Denove li aŭdas la furiozan grum-bladon kaj spiregadon super sia kapo. Kaj subite la kruelaj dentoj, kvazaŭ ŝtala pinĉ-kaptilo, ĉirkaŭkaptas la teneran korpeton de Fluro. Liaj tenacaj ostetoj krakas... Post lasta rigardo super la blanka senfinaĵo, la libereco, la vivo sur la malnova ĉasteritorio de Vela, lia patrino, la kuraĝa koro de Fluro cedas.

Steven Doring, la kampulo, tenas la mortigitan foinon inter la dikfingro kaj la montro-fingro de la maledkstra mano antaŭ siaj okuloj kaj rigardas, ĉu la altvalora felo ne estas damaĝita. Li vidas la malgrandajn blankajn dentojn inter la iomete levitaj lipoj kvazaŭ en lasta grimaco de malamo. Li taksas la prezon. Tiam li frapetas la hundon sur la kapon.